





# TRI BOTANIKAJ ĜARDENOJ EN BRNO



Oldřich Arnošt Fischer



**Prelego por vernisaĵo en Esperanto-Muzeo en Svitavy, la 20an de junio 2026**

En moravia urbo Brno troviĝas tri botanikaj ĝardenoj.

## Centro de Medicinaj Plantoj de Medicina Fakultato de la Universitato Masaryk.



Ĝi situas en centro de la urbo, sur sudorienta deklivo de Kraví hora, en altitudo 281 m.
Areo 0.9 ha estas trovloko de ĉirkaŭ 1 000 da plantoj.

En la jaro 1952 docentino Věna Spurná kaj profesoro Vladimír Rajmund Homola ĝin fondis por Farmacia Fakultato de la Universitato Masaryk, sed en la jaro 1960 oni la fakultaton translokigis en Bratislavon. Pro tio la centro apartenas al Medicina Fakultato de la Universitato Masaryk.
La unua estro estis ĝardenisto Stanislav Dvořák.

Oni ĉi tie instruas disciplinojn farmacio kaj nutrado de homoj.
Centranoj kunlaboras kun bioĥemia instituto: el plantoj el la familio Papaveraceae oni jam izolis multajn novajn alkaloidojn.

En la centro kreskas medicinaj plantoj, venenaj plantoj, aromaj kaj radikaj legomoj, plantoj el la familio Papaveraceae, tonikaj plantoj (plantaj akordigantoj). Ekzemple:




*Schisandra chinensis* enhavas adaptogenojn (efikajn substancojn, kiuj helpas kontraŭ stresaj situacioj).




*Arctostaphyllos uva-ursi* enhavas efikajn substancojn, kiujn oni uzas por kuracado de urinaj vojoj.




*Chelidonium majus* estas la planto, kies semojn disvastigas formikoj. Oni ĝian oranĝkoloran fluidaĵon uzadis kontraŭ verukoj. Laboristoj de la centro en la ĥelidonio trovis alkaloidon makarpinon, kiun kuracistoj uzas por malkovro de leŭkemio kaj aliaj kanceraj malsanoj.

*Sorbus domestica* (Rosaceae).




Sur sorparbo *Sorbus domestica* maturiĝas tradiciaj moraviaj fruktoj – manĝeblaj sorpoberoj.

Adreso: Centrum léčivých rostlin LF MU, Údolní 74, 602 00 Brno.

**Botanika Ĝardeno kaj Arboreto de la Universitato Mendel**

Ĝi situas en Brno-Černá Pole en altitudoj 220-250 m.


Ekstera tereno mezuras 11 ha, forcejoj 850 $m^2$. En la ĝardeno kreskas ĉ. 4 000 da orĥideaj taksonoj, 300 da tilandsiaj taksonoj, 5 000 da lignoplantaj taksonoj kaj 4 000 da taksonoj de nelignecaj plantoj.

En la jaro 1926 profesoro Rudolf Dostál fondis ĝardenon kun agrokulture signifaj plantoj, al kiu poste profesoro August Bayer aldonis areon 1 ha kun lignoplantoj.

En la jaro 1970 komenciĝis konstruado de nova botanika ĝardeno.

Rondaj bedoj.





La plej alta arbo estas *Sequoiadendron giganteum*.



En malnova arboreto funkcias meteorologia observejo, kiu anstataŭis originan observejon de profesoro Václav Novák el la jaro 1929. Kunlaborante kun brna filialo de Hidrometeorologa Instituto kaj Urbodomo de la Urbo Brno oni tie mezuras poluadon de vivmedio.

Ĝardeno por nevidantoj prezentas plantojn, kiujn oni kapablas ekkoni pere de palposento.


Sur sudaj deklivoj troviĝas kolekto de saksifragoj, forcejo kun alpaj plantoj, terasoj kaj kaskadoj.

Interesaĵo de la ĝardeno estas tranĉeoj, kiuj estas en suda flanko. Vintre ili estas kovritaj per plasta folio. Tie oni plantas mediteraneajn, nov-zelandiajn, aŭstraliajn, amerikajn kaj orient-asiajn plantojn.

Tranĉeo vintre.



Tranĉeo somere.



En la dua duono de majo vizitantoj povas admiri ekspozicion de irisoj.

Ekspozicio de irisoj.









Ekspozicio de irisoj.



La ĝardeno havas inĝenian sistemon de akvaj kaskadoj kaj basenetoj.

Baseneto kun filikoj, muskoj kaj saracenioj.







Pro tio ekde fino de aprilo vizitantoj povas aŭskulti anurojn kaj admiri koi-karpojn kaj libelojn.

*Pelophylax ridibundus*, nia la plej granda amfibio.





Esknetoj *Coenagrion puella* (maldekstre), *Pyrrhosoma nymphula* (dekstre).





Libeloj *Libellula quadrimaculata, Libellula depressa.*





La ĝardeno specialiĝas al plantado de orĥideoj. Diligenta virina teamo plantas la orĥideojn el semoj sur nutriganta agaro. Danke al tio la ĝardeno apartenas al elstraraj laborlokoj, kies produktoj ricevis multajn medalojn en internaciaj ekspozicioj.

Orĥideoj *Dendrobium herceglossum* (maldekstre) kaj *Phalaenopsis equestris* (dekstre).





Orĥideoj (Orchidaceae).









Antaŭprintempe kaj novembre oni aranĝas ekspoziciojn de la orĥideoj, ekde la jaro 1999 ĉiam kun prezentado de vivantaj, elkrizalidiĝantaj ekzotaj papilioj.

Ekzotaj papilioj.







Ekde fino de septembro ĝis komenco de oktobro tie okazas la ekspozicio "Aŭtunaj Koloroj" („*Barvy podzimu*").

En oktobro 2006 en Brno estis observita nova insekto, la heteroptero *Leptoglossus occidentalis*, kiu estis al portita verŝajne kun aĉetitaj pinglarboj el Kanado. La heteroptero suĉas fluidaĵojn el nematuriĝantaj strobiloj de pinglarboj. Ĝi ne atakas homojn, nur aŭtune ĝi en domoj serĉas lokon por travintrado.

Heteroptero *Leptoglossus occidentalis*.



Dum Universala Kongreso de Esperanto (2025) ni malkovris Arbon de Internacia Interkompreno.

Malkovro de la Arbo de Internacia Interkompreno.



***Acer palmatum*** **(Sapindaceae).**




Adreso: Botanická zahrada a arboretum Mendelovy univerzity v Brně, Zemědělská 1, 612 00 Brno.

**Botanika Ĝardeno de Naturscienca Fakultato de la Universitato Masaryk**

Ĝi situas proksime de urba centro en altitudo 250 m. Ekstera tereno mezuras 1.5 ha, forcejoj 1 100 $m^2$.
En la ĝardeno troviĝas entute ĉirkaŭ 4 000 da plantaj taksonoj.
En ekstera ĝardeno estas 2 500 da taksonoj, el ili 500 da lignoplantoj,
en forcejoj troviĝas 1 500 da plantoj.

Forcejoj.



En la jaro 1922 ĝin fondis profesoro Josef Podpěra.
En la jaroj 1995 – 1997 oni la ĝardenon transkonstruis.
Kvin novaj forcejoj estis konstruitaj laŭ propono de Petr Talunda.
Rekonstruado de la forcejoj kaj nova metala barilo estis projekto de Jiří Babánek.

En forcejoj oni povas trarigardi tropikajn plantojn kun *Victoria cruziana*, filikojn kaj cikasojn, subtropikajn plantojn, bromeliojn kaj sukulentojn.

*Musa* sp. – Bananujo (Musaceae).





La ruĝa floraro estas maskla floraro de la bananujo.

Forcejo kun insektovoraj plantoj, filikoj kaj cikasoj.



Insektovora planto *Nepenthes truncata* (Nepenthaceae).






Insektovoraj plantoj *Pinguicula agnata*, *Pinguicula grandiflora* (Lentibulariaceae).





*Gymnocalycium megalothelos, Sedum morganianum, Aechmea drakeana.*







*Mammillaria carretii, Mammillaria prolifera* subsp. *texana* (Cactaceae).





Ekstera ekspozicio enhavas plantojn de suda Moravio kaj plantojn de modera klimato.

Fagopiro – *Fagopyrum esculentum* (Polygonaceae).





Aŭtune vin surprizos arbedo kun nekutime violkoloraj fruktoj:

*Callicarpa japonica* (Lamiaceae).



Ekde la jaro 1997 oni faras ekspoziciojn de artaĵoj.

La ĝardeno servas al studentoj de la fakultato kaj publiko.
En januaro oni aranĝas Tagojn de Malfermita Pordo,
en aprilo Tagon de Tero,
en majo Ekspozicion de Insektovoraj Plantoj
en septembro Ekspozicion de Sukulentoj,
en oktobro Ekspozicion de Citrusoj, Subtropikaj kaj Tropikaj Utilcelaj Plantoj
kaj en novembro Ekspozicion de Ornama Birdaro, Kobajoj kaj Aliaj Bestoj.

Adreso: Botanická zahrada PřF MU, Kotlářská 2, 611 37 Brno.

Ĉiuj tri botanikaj ĝardenon havas internaciajn kontaktojn kaj ŝanĝas semojn kun aliaj botanikaj ĝardenoj. Ili ne estas nur lokoj por ripozo, sed ankaŭ signifaj edukaj centroj. En botanikaj ĝardenoj estas konservitaj genofondon de plantoj, kiuj en naturo estas tre raraj kaj endanĝerigintaj per elmortado.

**Rekomendita literaturo**


CHYTRÁ, M. & ONDRUŠKOVÁ, H. 2005: Botanická zahrada Přírodovědecké fakulty Masarykovy univerzity, paĝoj 85-99. En: CHYTRÁ, M., PROCHÁZKOVÁ, A. & SEKERKA, P. (ed.) 2005: Botanické zahrady a arboreta České republiky. 2a eld., Prago, Academia Unie botanických zahrad České republiky, 519 paĝoj.

DOLNÝ, A., HARABIŠ, F. & BÁRTA, D. 2016: Vážky (Insecta: Odonata) České republiky. 1a eld., Prago, Academia, 342 paĝoj.

FISCHER, O. A. 2016: Zajímavé nálezy vážkovitých (Libellulidae) z jižní Moravy, paĝoj 40-42. En: WALDHAUSER, M. (ed.) 2008: Vážky 2008. Sborník referátů XIX. celostátního semináře odonatologů v Brdech. 1a eld., Vlašim, ZO ČSOP Vlašim, 160 paĝoj.

FISCHER, O. A. 2022: Arboj kaj arbedoj (Pinophyta kaj Magnoliopsida). 1a eld., Brno, MSD, 53 paĝoj.

FISCHER, O. A. 2024: El mirinda mondo de kaktoj (Cactaceae). 1a eld., Brno, MSD, 131 paĝoj.

FISCHER, O. A. 2024: Orĥideoj vivantaj kaj sur poŝtmarkoj (Asparagales, Orchidaceae). 1a eld., Brno, MSD, 83 paĝoj.

MUSIL, P. & NOVOTNÁ, A. 2005: Centrum léčivých rostlin Lékařské fakulty Masarykovy univerzity, paĝoj 61-67. En: CHYTRÁ, M., PROCHÁZKOVÁ, A. & SEKERKA, P. (ed.) 2005: Botanické zahrady a arboreta České republiky. 2a eld., Prago, Academia Unie botanických zahrad České republiky, 519 paĝoj.

PAVLÍK, M. 2005: Botanická zahrada a arboretum Mendelovy univerzity v Brně, paĝoj 69-83. En: CHYTRÁ, M., PROCHÁZKOVÁ, A. & SEKERKA, P. (ed.) 2005: Botanické zahrady a arboreta České republiky. 2a eld., Prago, Academia Unie botanických zahrad České republiky, 519 paĝoj.

ŠEFROVÁ, H. 2006: Arboretum MZLU v Brně – refugium fauny uprostřed města. Veronica, 20: 14.

ZWACH, I. 2013: Obojživelníci a plazi České republiky. 2a eld., Prago, Grada Publishing, 519 paĝoj.


**Personaĵoj**

Bayer, August (1882 – 1942)
Dostál, Rudolf (1885 – 1973)
Homola, Vladimír Rajmund (1905 – 1991)
Novák, Václav (1888 – 1967)
Podpěra, Josef (1878 – 1954)
Spurná, Věra (1925 – 2017).

**Ĉiujn fotojn faris aŭtoro de la prelego.**